

Mallonga raporteto pri la KER-ekzamenoj en 2011

En la tria jaro de la sistemo okazis 10 novaj sesioj. La komisionoj agadis en 10 urboj de 7 landoj: Roterdamo (NL), Sète kaj Grezijono (FR), Waldfischbach-Burgalben kaj Herzberg (DE), Brazilo kaj São Paulo (BR), Kopenhago (DK), Madrido (ES) kaj Torino (IT). Entute tiel en la tri jaroj estis aranĝitaj 24 sesioj en 14 landoj.

Nivelo	B1	B2	C1	Sume
Jaro				
2009	17	25	84	126
2010	35	48	75	158
2011	42	72	127	241
Sume	94	145	286	525

La 284 ekzameniĝojn de la unuaj du jaroj ni preskaŭ duobligis en 2011 kun 241 ekzamenokazoj. Tiel fine de la tria jaro ni havis 525 ekzameniĝintojn. La kandidatoj venis el 46 landoj.

Lando	B1	B2	C1	Sumo	Poentoj*
1. Brazilo	31	42	57	130	286
2. Francio	21	24	55	100	234
3. Italio	1	3	30	34	97
4. Germanio	8	12	20	40	92

La plej multaj personoj ekzameniĝis el Brazilo (130), ilin sekvas francoj (100) kaj en la tria kaj kvara loko staras Germanio (40) kaj Italio (34).

La ciferoj nur la ekzamenokazojn indikas. Pri la eventualaj sukcesoj pretiĝos detala statistiko fine de la 4a jaro, sed la malsukcesintoj estas malpli ol 4-5 % de ĉiuj kandidatoj.

La jaro 2012 montriĝos same eventoplena. La KER-sistemo atingos ankaŭ Azion kun la ĉina kaj vjetnama sesioj. Nova iniciato estas la **Tutmonda skriba sesio**, kiun la komisiono anoncis por la 9a de junio kaj al kiu ĝis la komenco de februaro jam aliĝis pli ol 15 urboj el 10 landoj. En tiu tago samtempe okazos sesioj en diversaj partoj de la mondo, plejparte kun la envolvo de respresentantoj de ne-esperantistaj eduksistemoj kaj organizioj.

Fine de la 4a ekzamenjaro la tuta sistemo trairos kompletan kvalitkontrolon fare de la respondeculoj de la Asocio de Lingvo-Testistoj de Eŭropo (ALTE).

Pliaj informojn pri la ekzamenoj trovi en la paĝaro www.edukado.net.

* La kalkulado de poentoj okazis tiel, ke la B1 valoras 1, la B2 valoras 2 kaj la C1-nivelo 3 poentojn.

Katalin Kováts, gvidanto de la ekzamenkomisiono de UEA.